Gerda Illerhues,

Abenddämmern

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Gerda Illerhues,

Vespera krepusko

tradukita de Manfred Retzlaff

Vespera krepusko –
Sinkas la sun'.
Ombrojn ludantajn
vidas mi nun.

Vespera krepusko –
Susuras la vent',
fora ekrido
en la silent'.

Vespera krepusko –
Aŭdiĝis jen kri',
turmenta hastado,
jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –
Eklumas la klar',[3]
dum noktoproksimo,
de la stelar'.

Vespera krepusko –
Tempo de l' ben',
estonto tre foras
kaj la maten'.

Vespera krepusko –
ripoz' ĉie ĉi,[4]
paca trankvilo
elmane de Di'.

...

[3] aŭ:
Eklumas en klar',
dum nokt' proksimiĝas,
jen la stelar'.

[4] aŭ senrime:
ripozas la land',
paca trankvilo
el Dia man'.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Gerda Illerhues *(∗1930).*

Arg-771-1545 (2013-01-16 18:15:06)

Tiu ĉi poemo aperis en la jaro 2001 en la gazeto "Landwirtschaftliches Wochenblatt für Westfalen-Lippe". La verkinto, s-ino Gerda Illerhues, loĝis en Lehmbergstr. 50, D-46282 Dorsten, Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Abenddämmern" de Gerda Illerhues *(∗1930) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2001-05-29.*

MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)